

Likvida komisiono  
DE ESPERANTO-ASOCIO EN ĈSR  
Praha II, M.Štěpánská 7.

Praha, la 15-an de oktobro 1952

Al niaj grupoj kaj membroj !

Speciala komitata kunveno de Esperanto-Asocio en ĈSR, kunvokita laŭ deziro de la ministerio por internaj aferoj, deklaris la 6-an de septembro 1952 likvidon de la Asocio.

Ni donas al vi tiun informon kun peto, ke vi konsideru finita la agadon de la Asocio kaj ke vi afable komprenu, ke la Asocio ne plu povas servi vin, kiam vi ricevos tiun ĉi cirkuleron. La grupojn ni petas, ke ili transdonu la sciigon al siaj membroj.

La gvidintoj de la Asocio sincere premas manon al siaj amikoj kaj kunlaborintoj kun la espero, ke ili laŭ la ekzistantaj eblecoj daŭrigos sian laboron.

Samideane salutas  
Likvida komisiono

de ESPERANTO-ASOCIO EN ĈSR

PS. Kiu posedis bonhavan ĉe la Asocio, ricevos sendaĵon laŭ sia mendo aŭ anstataŭaĵojn kiam la menditaj objektoj ne plu estis haveblaj. Abonintoj de "Heroldo" kaj de "Esperantologio" ricevos siatempe la restintajn numerojn.  
La Esperantista klubo en Praha /adreso: J.Šustr, Dlouhá 10, Praha I./ povos liveri post 1.11.1952 kelkajn ekzemplerojn de la multobligita lernolibro de Krajíc.